

Dek tagoj de kapitano Postnikov

Aldonita de Miĉto Vrhovac
02/09/2009

La multimedia teatraĵo "Dek tagoj de kapitano Postnikov" sian premieron havis la 28-an de julio 2009 dum la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko. La teatraĵo estas preparita laŭ la samtitola romano de la rusa verkisto Mikaelo Bronĉtejn, kiu mem preparis la scenaron. La teatraĵo estas projekto de SHELTER SCENO el Kragujevac (Serbio), fondita en la jaro 2001, kaj tiu ĉi estas la jubilea deka teatraĵo de Saĉja Pilipoviĉ dum Universalaj kongresoj. Aktoris: Saĉja Pilipoviĉ kiel kapitano Postnikov, Miĉto Vrhovac kiel d-ro Zamenhof kaj Ljubica Gaĉparoviĉ kiel Lidoĉka. Lia reĉisoro estas Miliĉ Jovanoviĉ el Kragujevac kaj la muzikaĵtorino Elena Puhova el Āeĉio. La moderna teatraĵo parolas la Esperanta historio antaŭ unu jarcento, kaj ĉefaj personoj estas la rusa kapitano Postnikov kaj la kreinto de Esperanto d-ro Ludoviko Zamenhof. La spektaklo okazis en unu el la teatraĵoj de Bjalistoko kaj ĉin spektis ĉirkaŭ 300 esperantistoj.

La teatraĵo estis bone akceptita de la publiko kaj de la teatraj fakuloj. Planataj estas sekvaj prezentadoj en Rusio, Irlando, Bosnio kaj Hercegovino kaj Serbio. La unuaj el la planitaj okazos en Kragujavac dum la internacia festivalo "Joakim Interfest" la 15-an de oktobro kaj en Banja Luka proksimume tri semajnojn poste.